

Georg Heym,

## Ĉiuj pejzaĝoj

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

Ĉiuj pejzaĝoj plenas  
jam de l' blu' laŭ hor',  
ĉiu bosk' kaj arb' de l' rivero  
ŝvelanta al norda for'.

Blankaj eskadroj, nuboj,  
densa velobend'.  
Kaj la bordoj ĉielaj post tio  
disiĝas en lum' kaj vent'.

Se l' vesperoj sinkas,  
dorm' anoncas sin,  
iras la sonĝoj, la belaj,  
facilpiede en nin.

Ili ludas timbalojn  
mane sen sovaĝ'.  
Kelkaj flustras kaj tenas  
lumojn ĉe la vizaĝ'.

...

Georg Heym,

## Alle Landschaften

Alle Landschaften haben  
Sich mit Blau erfüllt.  
Alle Bäume und Büsche des Stromes,  
Der weit in den Norden schwillt.

Leichte Geschwader, Wolken,  
Weiße Segel dicht,  
Die Gestade des Himmels dahinter  
Zergehen in Wind und Licht.

Wenn die Abende sinken  
Und wir schlafen ein,  
Gehen die Träume, die schönen,  
Mit leichten Füßen herein.

Zymbeln lassen sie klingen  
In den Händen licht.  
Manche flüstern und halten  
Kerzen vor ihr Gesicht.

...

*Traduko de la Germana poemo "Alle Landschaften" de GEORG HEYM (\*1887 – †1912) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-169-337 (2004-02-15 16:24:55)*

*Georg Heym estis la filo de prusa justicoficisto, vizitis la gimnazion kaj ekstudis sen la plej eta emo jurosciencon. En liaj taglibroj reveme staras apud Baudelaire, Verlaine, Rimbaud, Keats, Shelley, la nomoj de Kleist, Grabbe, Büchner. "En miaj sonĝoj mi ĉiam vidas min kiel Dantonon aŭ kiel viron sur la barikado..." En januaro de la jaro 1912 li dronis ĉe la sketado sur la glacio en la rivero Havel. La frua perfektiginto postlasis malmaleksan verkon. "Sed tiuj tricent paĝoj kvindek jarojn okupis kaj traskuis legantojn kaj komentistojn. Estis antaŭ ĉio kelkaj poemoj kiel 'Kun la veturantaĵoj ŝipoj', 'Viaj okulharoj, la longaj', 'Berlino', kiuj ĉiam restis efikaj, novaj, ekzemplodonaĵoj. Neniu, kiu legis tiujn strofojn, povis forgesi ilin tute. Neniu antologio, kiu pretendis esti valora, povis esti sen ili... Georg Heym konsternis la tempkunulojn kaj la postnaskitojn per malvasta verko, kiu senpardone aŭguris teruron kaj pereon, kiam aliaj ankoraŭ diboĉis en ekstremaj idilioj..." [Laŭ la dorsa flanko de blukolora Reclam-kajereto tradukita el la germana de Hans-Georg Kaiser (Cezar').]*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas GEORG HEYM (\*1887 – †1912).*

*Arg-169-336 (2004-02-15 17:04:41)*

*Georg Heym war der Sohn eines preußischen Justizbeamten. Er hatte das Gymnasium besucht und begann dann ein Jurastudium, jedoch ohne große Begeisterung. In seinen Tagebüchern finden sich Eintragungen über Baudelaire, Verlaine, Rimbaud, Keats und Shelley und die Namen der deutschen Dichter Kleist, Grabbe und Büchner tauchen darin auf. Er schrieb: "In meinen Träumen sehe ich mich als Danton oder als einen Mann auf einer Barrikade ..." Im Januar des Jahres 1912 ertrank er in der Havel beim Schlittschuhlaufen auf dem Eis. Der früh Vollendete hinterließ ein nicht sehr umfangreiches Werk. Aber die dreihundert Seiten seines Werkes beschäftigten und erschütterten während der folgenden fünfzig Jahre die Leser und Philologen. Vor allem sind es einige Gedichte wie "Mit den fahrenden Schiffen", "Deine langen Wimpern" oder "Berlin", welche in ihrer Neuartigkeit beispielhaft waren und die Menschen immer wieder berührten. Niemand, der diese Verse las, konnte sie je wieder ganz vergessen. In keiner Gedichtsammlung durften die Gedichte Georg Heyms fehlen ... Er erstaunte seine Zeitgenossen und die Nachgeborenen mit einem schmalen Werk, in dem er unerbittlich Schrecken und Untergang voraussagte, als andere noch sich vergnügten und von einem beschaulichen Leben träumten ...*